n-ro 74

oktobro 2001

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## IKEF-retpaĝoj modernigitaj

Dank'al laboro de Stefan Fisahn la retpaĝoj de IKEF (je www.ikef.org aŭ www.xs4all.be/~rotsaert/ikef/) havas pli modernan aspekton (kvankam enhave ne estas ŝanĝoj). Kreo de interreta datumbazo kiu povas anstataŭi la iaman identecŝildaron estas pristudata. (rr)

## Printempo de 2002: Dua kunsido por ĉinaj IKEF-anoj

Ĉinaj IKEF-membroj WANG Tianyi kaj ZHANG Changsheng interkonsentis ke dum la printempo 2002 en la urbo Changzhou okazos la dua kunsido por ĉinaj IKEF-anoj kaj E-komercistoj. Tie oni i.a. povos diskuti pri aliĝo de Ĉinio al Monda Organizaĵo pri Komerco (angle: WTO). Kompreneble, oni ankaŭ esperas ke eksterlandaj IKEF-anoj partoprenos la kunsidon, sed ĝi ne dependas de tio... ĉar la ĉinaj mem havas multajn spertojn pri praktiko de Esperanto en komerca kampo internacia kaj enlanda. (WANG Tianyi, <informo(a)komerco.com>)

## Enhavo

UK Zagrebo: Raporto pri la Ĝenerala Kunveno . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3-4
Komercaj petoj kaj proponoj - Novaj membroj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 5
Vizito en la Ekonomia Ĉambro en Zagrebo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 8-9-11
Abonasoft: komputilaj programoj en Esperanto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 10
Valoranalizado enkadre de la profitorienta kaj buĝeta mastrumado . . 10-11

**La Merkato** (LM)(ĝis numero 26: Laŭokaza Novaĵletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; Prof. OOBA Atsua; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ www.xs4all.be/~rotsaert/ikef/

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83 (Swift: PCHQBEBB)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, reto financoj(a)fel.esperanto.be, belga pĝk. 000-0265338-43)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto sya-ma(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)



## Universala Kongreso en Zagrebo

### Raporto pri la Ĝenerala Kunveno 2001 de IKEF en Zagrebo (26 julio 2001, 12.30 h)

Prezidanto Franz Josef BRAUN kun ĉeesto de la estraranoj François Xavier GILBERT, KÖNYVES Zoltán, Roland ROTSAERT kaj YAMASAKI Seikô malfermis la kunvenon kaj salutis la 51 partoprenantojn, inter tiuj 26 membroj. Apartan saluton li dediĉis al la UEA-prezidintoj LEE Chong-Yeong kaj Grégoire MAERTENS kaj al AdE-prezidinto Werner BORMANN, ĉiuj membroj de IKEF. Jen la tagordo:

Raporto de la Prezidanto pri la agado de IKEF en la jaro 2000
Financa Raporto de la Financa Konsilanto Roland ROTSAERT
Decido pri pritrakto de la malprofito de EUR 951,22
Malŝarĝigo de la Estraro
Elektoj al la Estraro
Diskutoj pri celoj, taskoj kaj farotaj agadoj de IKEF (Laborplano 1998 - 2003 kiel bazo de nia agado)
Diversaĵoj

Raportoj - decido pri profito - malŝarĝigo

En sia raporto Prezidanto Braun atentigis al la skriba raporto aperinta en LA MERKATO n-ro 72 de aprilo 2001 sur la paĝoj 4-7. Li nur reliefe menciis la plej esencajn temojn el tiu skriba raporto kaj aldone gravajn aktualajn aferojn.

Unuafoje la membronombro falintis je 4 al 145 fine de 2000. La celo laŭ laborplano por tiu dato estis: 200 membroj. La moto "Ĉiu membro varbu novan" ne estis serioze realigita fare de la membraro. Renoma sukceso de la Terminara Sekcio estis la eldono de "INKOTERMOJ 2000" (esperantigo de "Incoterms 2000", priskribo de la kondiĉoj por kontraktoj en la internacia komerco). Koncerne novan taskon por tiu sekcio, la prezidanto menciis kontakton kun la Tradukservo de Eŭropa Unio en Luksemburgo pro ebla esperantigo de ĉ. 5000 nocioj el la fako komerco kaj ekonomio. Je alvoko de Braun al la ĉeestantoj en la kunveno por kunlaboro en tia terminara tradukoprojekto bedaŭrinde neniu anoncis sin preta.

La verka agado estis sur sama nivelo kiel en la antaŭa jaro. Apartan laŭdon ricevis Bo SANDELIN (IKEF 134) pro lia esperantigo de la libro "La historio de ekonomika pensado", de kio jam aperis dum 2001 serio de ĉapitroj en la revuo "Monato", nia ĉefa podio por verkado. Braun ankoraŭfoje virtuale defiligis la dumkongresan viziton 2000 ĉe la firmao ESHED ROBOTEC en Rosh-Haajnin apud Tel-Avivo. Li invitis la ĉeestantojn de la kunsido al simila agado, nome partopreno en la Ekonomia Ĉambro en Zagrebo je la posta tago. (Raporto pri tio sur paĝo 8). IKEF estis ankaŭ tre engaĝita dum la "Kolokvo pri apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST 2000) en Prago, kie prelegis kvin IKEF-membroj.

Apartan mencion ricevis la kunelaboro kun TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) kiu laŭplane evoluiĝas kaj kiu ĉi-aprile realigis komunan seminiaron pri fakaj temoj de ambaŭ asocioj en Storckensohn (orienta Francio). En ĉiu numero de LA MERKATO aperis anoncoj pri komercaj petoj kaj proponoj de esperantistaj komercistoj.

Iom kritike la prezidanto resumis, ke la jaro 2000 ne estis tiom sukcesa kiel la antaŭaj, ĉar multe da agadoj el la Laborplano 1998 - 2003 estis ne aŭ nur parte plenumitaj. Li alvokis la membrojn ke ili plifortigu siajn aktivecojn tiurilate.

La Financa Konsilanto, s-ro Roland ROTSAERT, prezentis kaj detale klarigis la ciferojn de la kontoj jam prezentitaj en LA MERKATO n-ro 72 sur paĝoj 8 - 10. La financa rezulto estis malprofito de EUR 951,22. Rotsaert klarigis, ke la kaŭzo pro tio estis antaŭ ĉio pli grandaj elspezoj por la terminara laboro (eldono de INKOTERMOJ 2000) kaj dum la UK en Tel-Avivo. Aldone mankis en 2000 enspezoj el reklamanoncoj en MONATO.

Laŭ propono de s-ro Rotsaert, la Ĝenerala Kunveno akceptis subtrahi la malprofiton de la kapitalo.

Sub gvidado de nia revizoro, d-ro Gianfranco POLERANI, la Ĝenerala Kunveno aprobis la raporton pri la agado kaj la financan raporton kaj unuanime donis malŝarĝon al la Estraro.

Elektoj

La oficperiodo de la kvar estraranoj, s-roj Roland ROTSAERT, François Xavier GILBERT, KÖNYVES Zoltán kaj YAMASAKI Seikô finiĝis en julio 2001. Dum la unuaj tri pretis denove kandidatiĝi, s-ro Yamasaki post 14jara estraraneco ne plu kandidatiĝis. La prezidanto varme dankis s-ron Yamasaki pro lia aktiva kaj efika laboro en tiuj jaroj kaj ankaŭ pro lia preteco daŭrigi la oficon de kunordiganto de la Terminara Sekcio.

Kiel anstataŭa kandidato prezentiĝis sole profesoro OOBA Atsuo el Japanio. En la elektoprocedo estis unuanime elektitaj la nomitaj kandidatoj Rotsaert, Gilbert, Könyves kaj Ooba.

Diskuto kaj diversaĵoj

Enkonduke, prezidanto Braun denove atentigis pri la "Laborplano 1998 - 2003" enhavanta taŭgajn agaderojn, al kiuj la membroj ĉefe koncentriĝu. En la diskutado estis precipe tuŝitaj la neceso de pli rapida starigo de aktualaj terminaroj pri la fakoj ekonomio kaj komerco, kio signifas plifortigon de la terminara laboro. Same multfoje menciita estis la neceso pri pli aktiva helpo al komercado inter esperantistaj komercistoj. Krome la diskutantoj forte sentis la mankon de elektronika membrolisto kun indiko de specialaj kapabloj kaj okupoj de ĉiu membro (iama "identecŝildaro"). La Estraro ekkonas nun la urĝecon de tiuj tri aferoj.

fjb

**Forpaso**

D-ro Bodo Schneider (IKEF 150) forpasis fine de la jaro 2000, preskaŭ 70jara. Li estis membro ekde 1992.

**Peterburgo: 2002a konferenco ne okazos**

La konferenco 'Banlokoj, ekologio, klerigado', anoncita en LM73, p. 4, NE okazos.



**Komercaj petoj kaj proponoj**

**Ĉinio**

Mia ubro Xinyang situas en la suda parto de Henan-provinco. Ĝi estas granda agrikultura urbo kaj abundas agrikulturajhoj. Iuj estas tradiciaj produktoj por eksporto. Nia asocio nun ekperas eksporton pere de Esperanto. Ni ofertas jenajn produktojn: * kaŝtano, kaŝtanaj ladmanĝoj, sukoj, ktp. * ginko, ginkaj folioj kaj ginka teo * sezamo * verda teo * bulbo de lilio * arakido * porka kolhararo.
Se vi interesiĝas pri niaj ofertoj, skribu por peti pli detalajn informojn. Mi ankaŭ volonte peras vian oferton al Ĉinio kaj senpage aperigas vian reklamon en ĉinajn retejojn. Kunlaboraj proponoj ĉiam estas bonvenaj. Zhang Xuesong, rete <deodaro(a)263.net>, adreso: Changtaiguan Diangguansuo, CN-464193 Xinyang, Henan: telefono +86/376/8821 553.

**Irano**

S-ro Masud Gudarzi serĉas komercistojn kiuj aktivas en prilaboro kaj komerco de ŝtofo. Retadreso: <masud8422(a)yahoo.com>.

**Usono**

Mi ofertas oportunon utiligi diversajn esperantajn interret-nomojn (angle: domain names) videblajn ĉe www.domania.org, entreprenon kiun mi lanĉis dum la interreta frenezo. Hodiaŭ oni povus aĉeti iun ajn laŭvole, malmultkoste. Bernardo Stollman, IKEF 275, <gardrajt(a)aol.com>.

**Interreto**

Bonkvalitaj T-ĉemizoj kun E-Insignoj preparitaj el Italio, el bonegaj kaj longdaŭraj ŝtofoj nun estas akireblaj en nia T-Ĉemiza Butiko. Por mendi, bonvolu kontakti la butikon rete ĉe: tcxemizoj_esperanto(a)yahoo.com (A.O. Thompson). Makleraĵaj perantoj estas tutmonde serĉataj.

**Nova adreso**

158. Giuseppe Valente, via Mistruzzi 5,I-33100 UDINE, Italio; rete <VIGLO(a)estranet.it>

**Novaj membroj**

312.S-ro Thierry SALOMON - Abonasoft, Bakáts utca 1/3 III 1, H-1093 Budapest, Hungario; http://abonasoft.tsx.org, abonasoft(a)mail.com
313. S-ro Bernard BEHRA, 1, chemin de la Transhumance, F-68290 MASEVAUX, Francio
314. S-ino Gabriella FÜRJES, Kerepesi út 140-142 116 Hajtó, H-1144 BUDAPEST, Hungario, °1945, telefono 36/1/2222207
315. WANG Disheng, °1956, farmacisto, Bengbu Railway Hospital, CN-233040 Bengbu, Anhui, Ĉinio, tel: 0086-552-3925566(h), reto: wds5698(a)21cn.com
316. S-ino Simone LEDAN, 8, Cour des Bénédictins, F-77160 PROVINS, Francio,
317. S-ro Philippe BERIZZI, 117, Allée J.B. Clément, F-78570 ANDRESY, Francio, rete <philippe(a)berizzi.net>

fotoj



fotoj

**Vizito en la Ekonomia Ĉambro en Zagrebo je 27 julio 2001**

Je vendredo 27 julio 2001, 25-persona grupo de IKEF-anoj kaj interesitoj piediris de la kongresejo FER al la Ekonomia Ĉambro en la strato Draŝkoviĉeva n-ro 45. Inter tiuj estis nia membro Grégoire Maertens, prezidinto de UEA, kaj kiel speciala gasto nobelpremiito profesoro Reinhard Selten. En la Ĉambro atendis nin nia membro Mag. Radenko Miloŝeviĉ, estro de la sekcio pri makroekonomia politiko en la Ĉambro, kaj s-ro Milan Steviĉ, Ĝenerala Sekretario de la Ĉambro.

Komence IKEF-prezidanto Franz Josef Braun koncize prezentis la celojn de IKEF. Poste s-ro Steviĉ salutis la gastojn, ankaŭ nome de Prezidanto Zlatan Fröhlich, eĉ parte en Esperanto. Ĉe tio li menciis, ke la Ekonomia Ĉambro Zagrebo estis fondita en la jaro 1852 kaj li informis ke multaj aliaj Ĉambroj komence de la 20a jarcento deklaris helpon al Esperanto kaj parte laboris per Esperanto.

Venis la horo de s-ro Miloŝeviĉ. En perfekta maniero li estis preparinta sian prelegon, kaj per moderna rimedo por prezentado li faris siajn sciigojn. La enhavo pritraktis unue la nunan situacion de la kroatia ekonomio kaj due la specifajn problemojn de transira ŝtato, kia estas Kroatio. Ĉiu ĉeestanto ricevis esperantlingvan broŝuron enhavantan tabelajn datumojn kun tekstaj klarigoj pri la temo kaj ankaŭ pri la historio de la Ĉambro.

Post la sendependiĝo de Kroatio de eksa Jugoslavio en la jaroj 1991/1992 la socialisma ekonomisistemo devis esti transformata al merkata ekonomisistemo. Por malgranda Kroatio kun tersurfaco de 56.500 km$^2$ kaj loĝantaro de nur 4,5 milionoj, tiu deŝiro de pli granda ŝtato kaj de ĝiaj ekonomiaj rilatoj kaj establo de novaj rilatoj estigis malfacilan situacion kaj pezajn taskojn. Tamen, kvankam Kroatio estis sen internacia helpo, la ekonomia situacio evoluis pli bone ol en multaj aliaj transiraj ŝtatoj. La BNP en la unuaj jaroj de la sendependiĝo falis je preskaŭ 10 %, dume ekde 1995 ĝi denove kreskis averaĝe je ĉ. 2,5 % jare al nun - transkalkulite - pokape 4.600 USD. Malgraŭ tiu modesta kresko (modesta pro tio, ke mankas enlandaj kaj eksterlandaj investoj), pro la reordigo de la entreprenoj la senlaboreco plialtiĝis al aktuale 21 %. La averaĝa inflacio dum la jaroj 1995 ĝis 1999 estis 4,5 %; aktuale ĝi plialtiĝis al 6,8 %, precipe pro prezoplialtiĝo de diversaj importaĵoj. Jara eksporto nombras ĉ. 4,5 miliardojn da USD, sed importo de ĉ. 8 miliardoj da USD kaŭzas deficitan saldon de la ekstera komerco de ĉ. 3,5 miliardoj da USD. Per tio la ekstera ŝuldo daŭre kreskas. La ĉefaj eksportlandoj estas la najbaraj Italio (22% de la tuta eksporto), Germanio 14 %, Slovenio 11 %, Aŭstrio 7 %. En Zagrebo vivas 18 % de la kroataj loĝantoj, sed 44 % de la industrio troviĝas en la urbo. Do la ĉefurbo estas granda pezocentro. El tiuj datumoj ĉiu povas resumi, ke la ekonomia situacio de la lando estas malfacila kaj streĉa, aparte ankaŭ pro tio, ke pro la kreskanta tutmondiĝo de la monda ekonomio la postuloj plie altiĝas. Ĝojige estas la refortiĝo de la turisma flanko (ĉefe dalmatia marbordo) post ĝia terura falo sekve de la jugoslava/bosnia milito.

En posta vigla diskutrondo la ĉeestantoj starigis multajn demandojn. S-ro Miloŝeviĉ kompetente kaj profunde donis la respondojn (vidu la notojn de FXG aliloke en la revuo). Per tio fermiĝis la mozaiko de niaj scioj pri la situacio kaj problemaro de la kroata ekonomio. Dum frandado de posta koktelo en la Ĉambro, la partoprenantoj unu kun la aliaj aldone uzis la oportunon al interparolado. Malofte okazas dum niaj vizitoj ĉe lokaj firmaoj aŭ ekonomiaj institutoj en la kongresa urbo, ke aktiva Esperantisto el tiu firmao/instituto mem faras la prezentadon. Prezidanto Braun varme dankis al s-ro Miloŝeviĉ kaj donacis al la Ekonomia Ĉambro elektaĵon de terminaroj faritaj de IKEF, kaj la lastjare eldonitan INKOTERMOJ 2000.

fjb



Post la UK la prezidanto sendis jenan dankleteron:

## Abonasoft: komputilaj programoj en Esperanto

Abonasoft estas franca-hungara firmao kiu subtenas Esperanton. Krom mem uzi la lingvon kiel interna laborlingvo, Abonasoft produktas komputilajn programojn, kiujn apud kelkaj naciaj lingvoj eblas uzi ankaŭ en Esperanto. La programoj estas uzeblaj por nerekta varbado, ĉar ankaŭ ne-esperantoparolantoj povas uzi ilin, kaj dume vidi, ke Esperanto ekzistas kaj estas uzata en la praktiko. Ankaŭ la hejmpaĝo de la firmao estas en kvar lingvoj : Esperante, hungare, france kaj angle. Jam vizitis ĝin retumantoj el pli ol 50 landoj.

* SoftMemor estas lernoludo kiu helpas enkapigi vortojn. Per tiu programo oni povas krei ankaŭ proprajn demandarojn, krom la jam ekzistantaj: 400 esperantaj bazaj radikoj, baza gramatiko, tabelvortoj, anglaj kaj germanaj neregulaj verboj, francaj kaj italaj demandaroj, ĉefurboj, ktp.
* SoftNeuron estas mensomapo-kreilo. Mensomapo estas arboforma desegnaĵo, kiu ebligas pli efikan organizadon, lernadon, planadon. Per la programo eblas krei plurlingvajn mensomapojn. Eksporteblas kiel teksto, bildo, html-listo kaj RetMapoj.
* Per RetMapoj oni povas havi pli bonan superrigardon dum retumado (vidu ekzemplon "Esperanto en Interreto" ĉe http://retilo.ini.hu). Pri mensomapoj aperis artikolo en la revuo Kontakto, numero 182 (2001-2), paĝo 7.
* SoftMuzik estas originala intuicia muzikokomponilo, per kiu iu ajn povas komponi plurvoĉan muzikon por 128 instrumentoj, eĉ sen koni la tradician muziknotsistemon.

La prezo de la programoj estas ĉirkaŭ 10 eŭroj. Ili funkcias sub Windows 95/98/NT/2000/ME.

Ceteraj senpagaj programoj: per SoftVid eblas rigardi ĉiujn bildojn kiuj troviĝas en unu dokumentujo kaj fari ordon inter ili, per SoftZip eblas densigi dokumentojn, per SoftPiz maldensigi ilin. SoftSplit distranĉas grandajn dokumentojn por povi savi ilin sur disketojn. SoftKonvert konvertas Esperantajn tekstojn de unu skribo-metodo al la aliaj (x, c^, ^c, , c', c`, ch, lat3, unikodo).

Pliaj informoj ĉe: Thierry [tjeri] SALOMON, ABONASOFT
abonasoft(a)mail.com; http://abonasoft.tsx.org; tel. +36 1 217 3912
HU-1093 Budapest Bakáts utca 1/3 III 1

## Valoranalizado enkadre de la profitorienta kaj buĝeta mastrumado

Firmao GÖMBÖS Kft. organizos valoranalizan konferencon inter 2001.11.29 - 12.01 kies oficialaj laborlingvoj estos la hungara kaj esperanto. Temo de la konferenco estas: "Aplikado de la valoranalizado (angle: value analys) enkadre de la profitorienta kaj buĝeta mastrumado".
Celoj de la aranĝado:
Aplikado de la valoranalizado kaj disvastigo sur pli vastaj teritorioj, spertoŝanĝoj kaj starigo de kontaktoj por valoranalizon aplikantaj fakuloj parolantaj esperantlingve, scienca aplikado de la lingvo esperanto kaj ties prezentado por hungarlingvaj partoprenantoj.

Gömbös Jozsef (CVS, Certified Value Specialist - dipl. valoranalizisto)
Adreso: H-8900 Zalaegerszeg, Patkó u. 47. Rete: gombos.kft(a)zalaszam.hu. Poŝtadreso: H-8907 Zalaegerszeg. Pf. 9. Telefono/fakso: +36 92/317-845



### Kelkaj informoj pri la valoranalizado

La valoranalizado estas nova branĉo de scienco, kiu havas grandan teritorion. Ekzemple: planado, reduktado de la kosto (produktaĵo, teknologio, liverado, organizo, ktp.). Ĉie aplikeblas, kie objekto havas funkcion al kiu kroĉiĝas kosto. Kun miaj kolegoj mi laboris je multaj kampoj: vojkonstruado, maŝinfarejo, preparo de leĝo, instruada institucio, manĝaĵa industrio, teksa industrio, aŭtomobila industrio, konstrua industrio, oficeja organizaĵo, mastrumada institucio, ktp. Rezultoj de la valoranalizaj laboroj estis: konkurkapablaj produktaĵoj, raciaj funkcioj, estetikaj aperoj, uzeblaj institutoj, leĝoj, objektoj, malgrandaj kostoj. (GJ)

**Anglalingva fakliteraturo:**

1. Miles, L.D.: The fundamentals of value engineering. Proceedings of the SAVE National Convention, 1960.
2. Mattossian, B.G.: The Industriel Technique Value Analysis. Institution of Engineers and Shipbuilders, Glasgow, 1965.
3. Clawson, R. H.: Value Engineering for Management. New York, 1970.
4. Fallon, C.: Value Analysis to improve Productivity. New York, 1971.
5. Mudge, A.E.: Value Engineering. McGraw-Hill Book Company Inc. New York, 1971.
6. O'Brien, J.J.: Value Analysis in design and construction. New York, 1976.
7. Kamm, L.J.: Designing cost-efficient mechanisms. New York, McGraw-Hill, 1990.
8. Kirk, Stephen and Kent Spreckelmeyer: Enhancing Value in Design Decisions. Lawrence, KS, 1992.
9. Kirk, Stephen and Alphonse Dell' Isola: Life Cycle Costing for Design Professionals. New York, McGraw-Hill, 1995.

### Notoj de François-Xavier Gilbert dum la kunveno en la Zagreba Komerca Ĉambro

Demando: Kia estas la loko de la liberaj entreprenoj ?
Respondo: La nuna situacio estas malpli bona ol antaŭe ĉar kreskis la impostoj kaj la lukostoj de vendejoj. Oni timas la malaperon de la malgrandaj komercejoj.

D: Ĉu la loka valuto estas ligita kun alia valuto?
R: Ne, ĉar la registaro ne kapablas havi "valut-politikon".

D: Kial oni mencias nur germanajn markojn, kaj neniam la eŭropan monunuon eŭron?
R: La germana marko aperas kial subdivido de la eŭro. Estas en Zagrebo delegacio de la Eŭropa Unio.

D: En Kroatio, la salajronivelo estas duono de la hispana, tamen la kosto de la restado en hotelo estas pli alta ol en Hispanio. Kial?
R: La klientaro estas precipe germana. Ili trovas ke la prezoj estas bonaj.

D: Ĉu la kroata ŝtato havas politikon pri ŝparo de energio?
R: En la plano por la dek venontaj jaroj ne estas loko por la protektado de la naturo.

Rimarko de kroatino:
En Kroatio la privatigo estas tro rapida; tro da manaĝeroj estas sen kompetenteco.

Rimarko de oficisto de la Eŭropa Komisiono:
Kroatio ne ligu siajn prezojn al la germana marko ĉar Germanio ne (aŭ apenaŭ) havas inflacion. Kroatio havas altan inflacion, do la prezoj altiĝos pli kaj pli. Eble necesas devaluti la kuna-on.

IKEF-LABORPLANO kadre de UEA-Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo
Valideco plilongigita ĝis fino 2003 dum la ĝenerala kunveno de 28 julio 2000

| cif. UEA | speco de agado | responsulo ↓ prioritato ↓ |
|---|---|---|

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1.4.1 | Kampanjo "por pli vasta verdujo"<br>Pligrandigi la membraron de IKEF<br>a) Difino de celgrupoj varbotaj<br>Ĉiuj homoj, kies profesio aŭ pangajna laboro rilatas al komerco, ekonomio kaj ekonomiko<br>b) Difino de membronombro atinginda<br>200 membroj ĝis fino de 2000<br>- moto: Ĉiu membro varbu novan membron<br>- sendigi varbleteron tra UEA al ĉiuj UEA-membroj , kies profesio rilatas al nia fako<br>c) Krei argumentaron por "vendi" IKEF al siaj celgrupoj; establi laborgrupon por tio | estraro<br><br><br>estraro<br><br>ĉiuj m.<br><br>prez. FJB<br><br>prez. FJB | 1<br><br><br>1<br><br>1<br><br>1<br><br>2 |
| 1.4.2 | Celtrafaj IKEF-aj agadoj<br>a) Okazigi vizitojn dum UK-semajnoj ĉe lokaj entreprenoj kaj/aŭ ekonomiaj institutoj<br>b) Okazigi similajn vizitojn dum aliaj Esperanto-aranĝoj, kondiĉe ke almenaŭ tri IKEF-membroj ĉeestas la aranĝon<br>c) Havigi reklamanoncon de entreprenoj al E-gazetoj<br>d) Instigi kaj subteni negocon inter E-istaj komercistoj<br><br>e) Terminara laboro<br><br>f) Verki fakajn artikolojn en E-gazetoj | prez. FJB<br><br>koncernataj membroj ĉiuj membroj<br><br>ĉiuj membroj<br><br>Yamasaki<br><br>membroj k. ĵurna-lisma talento | 1<br><br>2<br><br>1<br><br>1<br><br>1<br><br>1 |
| 2.1.1 | Disvastigo de informoj pri E-o, UEA kaj IKEF<br>a) Regule ĝisdatigi kaj ampleksigi la IKEF-ajn informpaĝojn en TTT<br>b) Plibonigo/plirapidigo de la komunikado inter membroj per uzo de retpoŝto<br>c) Produkti nian IKEF-informilon E-lingvan ankaŭ en la plej gravaj naciaj lingvoj; krome tiaj tekstoj aperu in interreto<br>d) Post ricevo de la plej bonaj informiloj nun ekzistantaj kaj tradukeblaj el naciaj lingvoj, kiujn la UEA-estraro elektos, ni kunhelpos al traduko kaj disvastigo (nur de tiuj kiuj iom rilatas al nia fako) | <br><br>ĉiuj membroj<br><br>redaktoro RR<br><br>Yamasaki S. | 1<br><br>1<br><br>2<br><br>3 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 3.5 | Kontaktoj kun ekstermovadaj instancoj, kies aktivecoj rilatas al la celoj de IKEF<br>a) Komisiono de EU - Ekonomia Direkcio<br>b) Naciaj ministerioj pri ekonomio<br>c) Ekonomia fakultato de universitatoj kaj komercaj altlernejoj<br><br>d) Komercaj Ĉambroj | M. Cwik<br>prez. FJB<br>sciencistoj pri ekonomio<br>membroj kun K.Ĉ.-kontaktoj | 2<br>3<br>2<br><br>2 |